

Bankedo


Bankedano portu bankedobileton (troveblan en sia nomkartujo) al la bankedo-akceptejo, kaj tie interŝanĝu ĝin kontraŭ tablo-bileto. Tiel vi facile kunsidos kun amikoj, aŭ facile serĉos vakan seĝon eĉ se vi venos malfrue. La proceduro estas jena.

1. Ĉe la akceptejo, donu la bankedo-bileton kaj anoncu vian kongresan numeron kaj nomon.
2. Se vi volas kunsidi kun amikoj, reprezentanto kolektu kaj portu ĉies bankedo-biletojn, por laŭeble kuntabliĝi.
3. Akceptisto disdonos tablo-bileto(j)n kun tablonumero.
4. Iru al la numerita tablo. La lokon montros la akceptisto.
5. Akceptejo funkcios por 30 minutoj antaŭ la bankedo.
6. La kuntabliĝa deziro laŭ 2. ne nepre efektiviĝos, ĉar kiuj venos frue, fiksiĝos frue.
7. Organiza komitato anticipu fiksis seĝojn por gastoj, gastigantoj, mendintoj de vegetara manĝo ktp.

Ni preparos iom da alkoholaĵo. Aĉetu pli da alkoholaĵo laŭdezire, laŭ jena proceduro:

1. Pagante mendu alkoholaĵon ĉe bankedo-zorganto.
2. La zorganto donos biero-bileton, aŭ alian bileton laŭmende.
3. Vi ricevos la mendadon kontraŭ la bileto.

Detala informo estos ĉeloke anoncata.



Seĝoj estas liberaj. Sed en ĉiu tablo ne mankas eksterlandano.

Publika Koncerto

Karaj amikoj,

Bonvenon al la Publika Koncerto de la 100-a Japana Esperanto-Kongreso!

Ni, organizantoj de la koncerto, laboradis por krei koncerton, kiu povas pere de muziko efektiviĝi la kongres-temon: "Esperanto ligas homajn korojn – de la pli ol 100-jara historio al estonteco."

Ni decidis, ke la temo de nia koncerto estu: "Pere de Esperanto muziko ligas homajn korojn tra la tempo kaj spaco." Al ĉi tiu koncerto kolektiĝas esperantistoj kaj iliaj amikoj el Japanio kaj eksterlando. Ili prezentas ne nur familiarajn kantojn, kiuj estis, estas, kaj certe estos kantataj en la estonteco, sed ankaŭ modernajn muzikojn divers-ĝenrajn, japanajn kaj tutmondajn. Ni kunmetis vere ambician programon.

En ĉiu tempo la mondo havas problemojn. Japanio spertis grandan tertremojn en la distrikto Tohoku kaj akcidenton ĉe la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝimo. Multaj homoj ankoraŭ ne povas reveni al sia domo. Tuj post la katastrofo esperantistaj geamikoj tra la mondo esprimis simpatian al ni kaj daŭre kuraĝigas nin. Kiel forta subteno tio estas por ni! Inkluzivita en la programo estas ankaŭ kantado kaj reklamado de poemo pri la granda tertremo.

Espero naskiĝas el sincera kompreniĝado kaj komuniĝado inter ordinara homoj. Ni estos tre ĝojaj, se muziko povos ludi ian rolon en tio kaj se la koncerto ĉi-vespera ligos viajn korojn kaj sentigos al vi esperon por la estonteco. Ĝuu la koncerton tutkore.

YAMAKAWA Setsuko

みなさま、

第100回日本エスペラント大会公開コンサートへのご来場、ありがとうございます。大会テーマ「人の心をつなぐことばエスペラントー100 余年の歩みから未来へ」を音楽で表現するコンサートを実現したいと、実行委員をはじめ協力者たちで準備を重ねてきました。コンサートのテーマは、「エスペラントを通して、音楽は人の心をつなぐ、時と空間を超えて」です。エスペランチストとその仲間の音楽家たちが国内、国外から集い、過去から現在まで歌い継がれ未来に伝えたい歌、そして現代の音楽、日本だけでなく世界の音楽を、様々なジャンルで、演奏します。とても欲張りなプログラムが出来上がりました。いつの世も、世界は様々な問題を抱えています。日本も2011年3月11日、東日本大震災と福島第一原子力発電所の事故を経験し、今だ以前の生活に戻れない人たちがたくさんいます。直後から、世界中のエスペラントの仲間たちが心配して励ましてくれました。なんと心強いことでしょう。今回のコンサートでも震災を歌った歌や詩の朗読があります。普通の市民たちが心を通わせ交流しあうことから、希望が生まれます。音楽もその一端を担い、今宵のコンサートで皆さまの心がつながり、未来への希望を感じていただけたらうれしく思います。どうぞ、ごゆっくりお楽しみください。

山川 節子

Amika Vespero

- Kantado kun muziko : K-ON BANDO
Kantoj: (1) Donu al mi flugilojn (2) Mi tuŝis anĝelon (3) Kun via amo
- Kantado: Kanta Grupo de HAMA-Rondo kaj la partoprenantoj de faka kunsido "Ni kantu!"(gvidota de S-ro MAKINO Micuo)
Kantoj: (1) Aber-Infanar' (2) Floro de Orkid' (3) La Espero(Japane)
- Deklamo de poemo ("Pluvo" de Zamenhof) kun ludo de gitaro: KINUGASA Hiroshi
- Muzikado per mandolino kaj elektronika muzikilo kun klavaro: Mizro kaj Miyuki IWAYA
Muzikaĵo: (1) Teon kun vi (2) Kanto sur Plaĝo (3) Neniel en dimanĉo (4) Amatino de Bube (5) For kun la vento
- Stariĝo sur brakoj: KINUGASA Hiroshi
- Tradicia japana kantado el No-dramoj: OKUŬAKI Tosiomi
Dokugin(Utajo-solo): Takasago, Dokuĉoo(Utajo+ ŝultra tambureto): Seiobo
- Danco "Jaipongan": Ilia Sumilfia Dewi
- Ludo de "Bela Vespera Suna Teĝi-Gonfu-Ventumilo": Kamelia (Gao Youming)

親睦の夕べ

- 歌 (楽器伴奏付き) : K-ON BANDO
曲目: (1) 翼をください (2) 天使にふれたよ! (3) ふわふわ時間(タイム)
- 合唱: ハマロンド歌唱グループ及びエスペラントの歌・分科会参加者(指導: 牧野三男)
曲目: (1) みつばちの子の巣立つ朝 (2) 胡蝶の花 (3) ラ・エスペーロ
- ギター演奏及びザメンホフの詩「雨」の朗読: 衣笠弘志
- マンドリンとキーボードによる演奏: 岩谷満・美由紀
曲目: (1) 二人でお茶を (2) 浜辺の歌 (3) 日曜はダメよ (4) プーベの恋人 (5) 風と共
に去りぬ
- 逆立ち: 衣笠弘志
- 独吟(謡): 高砂、独調(謡+鼓): 西王母(せいおうぼ) - 奥脇俊臣
- 舞踊「ジャイボンガン」: Ilia Sumilfia Dewi
- 夕陽美太極功夫扇: Kamelia (Gao Youming)


Premio Ossaka

Honore al s-ro OSSAKA Kenji (1888-1969) “Patro de Japana Esperanto-Movado”, la Premio Ossaka estas donata ĉiujare al esperantisto(j), kiu(j) kontribuis elstare al la movado. La premio estis establita en 1938 okaze de la 26-a Japana Esperanto-Kongreso, memore al lia 50-jaraĝo.

al s-ro KURITA Kimiaki

La Premio Ossaka por 2013 estis aljuĝita al vi.

Vi dediĉis vin por Esperanto-Domo de Jacugatake dum multaj jaroj, kaj fondis aktivecan bazon de la Domo. Per kursoj kaj kunsidoj vi kontribuis ankaŭ por edukado, informado kaj interŝanĝo de kulturoj en Esperanto. Via kontribuo estas vere aprezinda.




Idealo de S-ino Morita kaj Esperanto-Domo de Jacugatake

Memorprelego de Ossaka-Premio, 09h00-10h25, dimanĉo, la 13-a de oktobro 403

Jam pasis preskaŭ dudek jaroj ekde kiam S-ino Yooko MORITA decidis donaci la Domon al JEI, kaj eble troviĝas multe da membroj kiuj ne sufiĉe bone informiĝis pri ŝi, do mi unue parolos pri ŝia intenco kaj cirkonstancoj de ŝia decido. Kaj due mi volas paroli pri la komencaj jaroj de la mastrumado de Esperanto-Domo de Jacugatake.

Mi parolos ankaŭ, kiel ni klopodis efektiviĝi ŝiajn pensojn kaj idealon pri Esperanto kaj Esperanto-movado. Ni, mi kaj miaj kunlaborantoj, en komencaj jaroj partoprenis en distriktaj eventoj en la nomo de E-Domo por disvastigi niajn ideojn, invitis eksterlandajn amikojn por havi parolado-kunvenon en la Domo, krom lerno-kunvenoj.



Intertempe mi, kiel eble, prezentos min mem, preparolante mian devenon, ideojn kaj rezultojn.

La literatura konkurso de JEI, 2013

Venis 4 konkursaĵoj. / 応募が4編ありました。

Prelegoj

Kiel serĉi budhismajn terminojn / 仏教用語をさがすこと

NISĜ Jasuhiro / 西 泰宏



Studraporta kunsido de JEI (1)

Tempo: 09h00-10h25, dimanĉo, la 13-a de oktobro

Ĉambro: 403

Jam estas neklare kiam, sed aperis jena artikolo, “Jam sufiĉas terminoj” sur la Revuo Esperanto de UEA. Mi tuj replikis, “Ne, ĉar kompare kun kristanismo, budhismaj vortoj estas tre malmultaj.” Oni respondis, “Ni komprenas vin, do vi proponu la vortojn.” Eble tiam ili intencis la novan PIV. Mi proponis novajn vortojn, kaj donis novajn priskribojn al la jam registritaj vortoj. Pasis dek jaroj, mi sentis neceson restigi paperojn, kial mi elektis tiujn kiel terminojn. Kaj hodiaŭ mi prezentas la terminojn antaŭ vi. La celo estas scii, ĉu mia pensmaniero pri traduko estas prava aŭ ne.

De antaŭe mi tradukas sutrojn kaj rilatajn librojn, por ke mi plibone komprenu la enhavon. Alie se mi nur legus sutrojn, mi facilanime preterirus malfacilajn partojn, kaj mi ne povus kompreni la kernon de la libro. En la tradukado foje mi devas nepre uzi specialajn vortojn, kiujn mi ne povas esprimi per ordinaraj vortoj. Troviĝas similaj vortoj en kristanismo, sed mi tute ne volas esprimi budhismon per la vortoj de kristanismo. Budhanoj ne iru al paradizo, nek al infero, sed al purlando aŭ narako. Budhanoj devas kompreni budhismon per la budhismaj vortoj.

Edo-Tokio vide al la ekspozicio de Edo-Tokia Muzeo

KAŬADA Akira / 川田明良



Kulturaj Prelegoj

Tempo: 10h30-11h50, dimanĉo, la 13-a de oktobro

Ĉambro: 403

Edo-Tokia Muzeo estis fondita de Metropola Tokia Registaro en 1993. En la nuna jaro la muzeo okazigas serion da specialaj eventoj memore de la 20-a datreveno de malfermo. La misio de la muzeo estas progresigi kompreniĝon pri la historio kaj kulturo de Edo-Tokio, kaj konservi kulturan heredaĵon de Edo-Tokio por sekvantaj generacioj.

La konstanta ekspozicio montras la historion de Edo-Tokio, kaj la vivmanieron kaj kulturon de la popolo kiu vivis tie. Edo estis renomita Tokio en 1868. La ekspozicio ampleksas proksimume 400 jarojn ekde 1590 kiam TOKUGAŬA Iejasu venis al Edo, malgranda havenvilaĝo tiam, ĝis 1964 kiam Tokio havis grandajn ŝanĝojn kun okazigo de la Olimpikoj en Tokio. Dum ĉi tiuj 400 jaroj Edo-Tokio suferis pereigajn krizojn de brulego kaj tertremego plurfoje, kaj aeratako en la 2-a mondmilito. Sed Edo-Tokio postvivis la krizojn en ĉiu fojo.

La ekspozicio aranĝis ne nur efektivajn materialojn sed ankaŭ reproduktitaĵojn. De rezultato de detala esplorado, la muzeo reproduktis kiel eble plej fidele restaŭritajn materialojn. Reproduktitaj interaktivaj materialoj aparte akiras bonan renomon de multaj vizitantoj. Por kompreni historion estas tre utile sperti la vivmanieron kaj kulturon de prapatroj per materialo kaj komuniki kun ĝi.

Mi volas prezenti kelkajn ĉefajn materialojn en la konstanta ekspozicio.

Plano de konservo de eterna vivo per scienco kaj teknologio

Yoshinori HAYAKAWA / 早川吉則



Kulturaj Prelegoj

Tempo: 10h30-11h50, dimanĉo, la 13-a de oktobro

Ĉambro: 403

Ĉiuj vivoj sur la tero estos ekstermotaj en estonteco se ni ne disvolvas sciencan kaj teknikan. La kialo estas la ŝanĝo de la suno al ruĝa giganto kaj la tero estos glutita. La plej proksima stelo al la suno estas 4,4 lumjaroj aparte. Ni alprenu dekmilionon da luma rapideco por spaca ŝipo, rezultante 44.000 jaroj por vojaĝo. Do ŝajnas racie porti genojn per spaca ŝipo kontrolota de komputilo. Post atingo al celata stelo, genoj estos rekreataj al la vivoj aŭtomate. Multaj disvolvoj de sciencoj kaj teknologioj estas devigaj. Por disvolvi novan sciencan kaj teknologian, sciencistoj devus esti sufiĉe edukataj. Efikeco de bazaj edukadoj, legado, skribado, kalkulo kaj internacia lingvo devus esti pliigotaj laŭeble. Universalaj Literoj Alfabetigaj, Komputilaj Ciferoj, Novaj Abakaj Ciferoj, Internacia Nombromono, kaj Esperanto ŝajnas ludi gravajn rolojn.

<http://www.cc.toin.ac.jp/tech/bmed/ft28/EternaVivoEsper.pdf> (Esperante)

<http://www.cc.toin.ac.jp/tech/bmed/ft28/EternalLifeEn.pdf> (English)

<http://www.cc.toin.ac.jp/tech/bmed/ft28/EternalLifeJp.pdf> (日本語)

La proverbaro japana el Proverbaro Esperanta (versio 7)

日本語から見た“Proverbaro Esperanta”の句

NIŜ Jasuhiro / 西 泰宏

Studraporta kunsido de JEI (2) 13h10-14h40 10/14 307

Oni povas legi japanajn proverbojn tradukitajn el de Proverbaro Esperanta fare de d-ro Zamenhof. Sed mi ankoraŭ ne vidas malan version, nome, unue en la japana kaj por tio ĝia adekvata frazo en Esperanto.

Kiel japano mi pensas pri aferoj en la japana lingvo. Tiutempe foje necesas proverboj. Sed ĉu la skribita proverbo de mi estas komprenebla aŭ ne por eksterlandaj konatoj, mi ne povas juĝi. Do, necesas materialo kiel traduki Esperanten por mia esprimo. En tiu pens-direkto, mi reordigis proverbojn ĉefe zamenhofajn. Por tio mi danke ricevis sugestojn de la libroj fare de niaj estimataj antaŭuloj, sed en ili foje mi trovis frazojn nekontentigaj al mi. Mi devis kritiki kelke da tradukitaj frazoj.

La ekzemploj estas jenaj. 赤の他人: parenco per Adamo. (PE 1862) / 惚れて通えば千里も一里: Por enamiĝinto Bagdad ne estas malproksima. / 破鍋に綴蓋: Estu ĉapo laŭ la kapo. (PE 549) , Kia la poto, tia la kovrilo. (PE 842).

Kaj ĉar proverboj troviĝas preskaŭ sennombraj, kaj mia cerbo estas malgranda, certgrade mi pretervidus iujn en Proverbaro Esperanta. Se vi trovis iun, volu montri al mi. Mi antaŭdankas.

Ekspozicio en etaĝo 7



Lifto al
rigardejo

Ekspozicio en koridoro

Ĝuu spektaklon de supre inter 09h00-21h30. Senpaga!

Restoracio